

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 527

SEPTEMBRO 1949

KONGRESA
NUMERO

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Itallingvo-perfektigemuloj plensukcesos. Legu Jarlibron 1948 p. 153 ; 1949 p. 43.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Interŝanĝas poŝtmarkojn k.ĉ.l. laŭ kvanto. Ernesto Guillem, Pintor Sorolla 11, Valencia, Hispanujo.

F-ino Imbriŝić Marija, Bjelovar, M. Tita ul 28, Jugoslavujo, deziras korespondi pri ĉiuj temoj, precipe pri literaturo kaj filologio.

S-ino Milaković Danica, Bjelovar, Kamenarova ul. 1, Jugoslavujo, deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

Korespondado. S-ro Karlo Schmauder, Im Hag 6, Stuttgart-Untertürkheim, Germanujo, U.S.Zone, sendas kontraŭ 5 respondkuponoj div. PM. Interŝanĝas PM.

S-ro Ako, Moston H 20, Lightbowne Road, Manchester 10, Anglujo, dez. kor. kun anglaj fraŭlinoj.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj John A. Umurs, studento, Groner Landstr. 14, Göttingen, Germanujo.

Brendon Clark, Leigh, N. Auckland, Nov-Zelando, petas por sia lernejo, glumarkojn de sur la komercaj produktaĵoj de ĉiu lando. Bonvolu klarigi Esperante, bildflanke, bele. Antaŭdankon.

Esperanto-Klubo, Leigh, N. Auckland, Nov-Zelando, petas bildkartan korespondon. Respondos laŭeble.

Mi ŝatus korespondi, interŝanĝi bildkartojn kun gejunuloj. Adreso: Mária Szabó, Móricz Zsigmond utca 1, Békés IV, Hungarujo.

Serĉata : Germana kaptito J. J. M. Evers, nederlandano, n-ro en koncentrejo Amersfoort 694. Nask. 2-2-24 en Helmond. Eble nun en rusa zono aŭ Ruslando. Sciigojn al A. W. Withoos, del. de UEA, Eindhoven, Nederlando.

Kun kanarikulturistoj en ĉiuj landoj interkorespondadus pri kanaritemo, S-ro Amado Pons, Sicilia 217, Barcelona, Hispanujo.

Ilustritajn poŝtkartojn (sen koverto !) interŝanĝas S-ro Tito de Barros Jr., farmaciisto, Av. Eptácio Pessoa 28, Santos, Brazilo, Sudameriko.

Letervespero. La sekcio Haarlem de L.E.E.N. aranĝos letervesperon en la komenco de Oktobro. Sendu viajn leterojn k.t.p. al S-ro N. Vergunst, Trompstr. 69, Haarlem, Nederlando.

Leteroj, poŝtkartoj, gazetoj, poŝtmarkoj, bezonataj kiel propagandiloj por nova Esperantista Kursoklubo. S-ro A. Puzin, 4 Rue des Etangs, Chatillon (Seine), Francujo. Nepre respondos poŝtkarte el Parizo.

Taŭga Esp. materialo por unusemajna Ekspozicio inaŭgurota la 15-an de Decembro urĝe bezonata. Ĉiu kunhelpanto ricevos almenaŭ poŝtkarton bele afrankitan. Esperanta Grupo de Bahia, Bángala 18, Cid. do Salvador, Brazilo.

Deziras korespondi kun tuta mondo per poŝtkartoj aŭ leteroj ; respondo garantiata ; bonvolu afranki filatele ; F-ino Gisèle Merre, 23 rue Fourcroy, Paris, Francujo.

20-jara studento, filatelisto, deziras korespondi kun junuloj kaj fraŭlinoj pri ĉiaj temoj ; nepre respondos. Skribu : Rovaglia, Coldilana 10, Como, Italujo.

Deziras korespondi, precipe pri muzikaj temoj, fortepiano-instruisto Ernest Moore, 35 Lakeside Avenue, Bolton, Lancs., Anglujo.

Komercistoj, atentu . . . Se vi volas vendi en Portugalujo viajn varojn, plezure kaj trafe mi estos via reprezentanto. Skribu al S-ro António J. Verissimo, Avenida Guerra Junqueiro 8, Lisboa, Portugalujo.

Mi dankas al ĉiu kiu respondis al la februara anonceto. Oni donis permeson daŭrigi la instruadon de Esperanto dum ankoraŭ unu jaro. Liston de lerneĵ-infanoj kiuj deziras korespondantojn mi sendos kontraŭ peto. S-ro Williams, Secondary School, Denton, Manchester, Anglujo.

Mandolin-ludado — Korespondo dezirata. Zamir, 16 Elhanan str., Tel-Aviv, Izraelo.

Angla knabo, 16-jara, volas korespondi kun gejunuloj. Skribu al Michael Lynn, 47 Sissons Road, Middleton, Leeds, Yorks., Anglujo.

32-jara librovendisto serĉas korespondadon kun tuta mondo. Multaj interesoj. Sören Kjaer, Tórshavn, Feroaj insuloj, via Danlando.

Letervesperon aranĝas Brighton-grupo unuan Decemb. 1949. Skribu al Esperanto-Grupo, Friends Centre, Ship Street, Brighton, Sussex, Anglujo.

Urĝa peto. Por grava kaj ampleksa varbekspozicio por Esperanto en la nova ĉefurbo Bonn de la germana respubliko ni urĝe bezonas ĉiuspecajn esperantaĵojn, gazetojn, librojn, broŝurojn, prospektojn, bildflanke afrankitajn poŝtkartojn, k.t.p. Sendu ilin amase al Esperantogruppe, Kirsch-Allee, 5-II, Bonn, Germanujo.

Sciencaj studentoj de Osaka Univ. dez. kor. kun junaj gesamideanoj. Skribu al s-ro M. Otsuka, 4 Kaminosima, Minogo, Nakakawati, Osaka, Japanujo.

NE RISKU VIN

antaŭ ol proponi man- kaj subskribitan tekston al

Alfred Nahon

Grafologio-konsilanto

99 rue de Richelieu, Paris, Francujo

15 jaroj da sperto

Referencoj el mondoj literatura, scienca, k.t.p. : Cocteau, Duhamel, Auguste Lumière, Ambasadoro Kammerer.

Sendu kelkajn subskribitajn liniojn sciigante aĝon kaj sekson.

Almetu al via sendaĵo :

por simpla studo :

Francujo : 250 fr. per poŝtmandato

aliaj landoj : 10 rpk.

por pli esplorita studo :

Francujo : 500 fr.

aliaj landoj : 20 rpk.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 527

KONGRESA NUMERO

SEPTEMBRO 1949

IMPRESOJ

pri la 34-a Kongreso en Bournemouth, 1949

Kiu ĉeestis kongresojn en Esperanto antaŭ 1914 kaj post la unua mondmilito, de la jaro 1920 ĝis 1939, ja nete konstatis la influon de la tempo sur niajn grandajn kunvenojn. Ne povas esti alie ĉar ĉio fluas, kaj ĉio estas influata de la eksteraj cirkonstancoj. Dum la unuaj kongresoj la problemoj diskutitaj estis tiuj de *konstituciigo* de la movado. Post la unua milito la problemoj ŝanĝis la aspekton, kaj oni povus diri, ke tio estis epoko de *firmiĝo* kaj de *konsolidiĝo*. La kongresoj post 1945, laborantaj sur la bazo de akiritaj spertoj, aspektas ankoraŭ alie. Ni eniras la epokon de la *specialiĝo*. Se antaŭe partoprenis la diskutojn multe pli da personoj, ofte kun utopiaj ideoj, tamen nuntempe tio estas la spertuloj kaj fakanoj, kiuj parolas kaj agas.

Tian impreson oni akiris ĉi tie en Bournemouth sub la ekvilibra klimato sudangla. Kun escepto de kelkaj mankoj lokaj, la organizo estis modela. Kio pleje ĝojigis, estis la senkompare pli mult-

nombra ĉeestantaro en la laborkunsidoj, mezurilo de la seriozeco. Spiritan ĝuon en plej alta grado havigis al la kongresanoj la prelegoj de la somera universitato, kie brilis fakanoj egalmezure lingve kaj fake. La inviton, kiom eble multe uzi nian lingvon, oni sekvis obeeme, ĉie oni aŭdis la sonorajn sonojn de nia lingvo kaj la publiko certe formis al si bonan ideon pri la funkciado de la internacia idiomo.

Por ke post la utila flanko ne manku la agrabla, ni trovis plezuraranĝojn tre diversajn. De la Varieteo ĝis la Ekskursoj ĉio kuniĝis en harmonio. La Kongresano estis bone servata! La unuan fojon la Esperantistoj kunvenis en mara banloko mondfama, kie multnombra publiko, nepelata de la ĉiutaga laboro, povis observi ilin. Finiĝis la 34-a kongreso; la 35-a okazos en Parizo, urbo kara al ni ĉiuj. Elkoran dankon al la bravaj gesamideanoj en Bournemouth pro la agrabla kongressemajno pasigita. H.J.

Promenante tra la kongreso

Post la tagoj de la antaŭkongreso en Londono, jen ni troviĝas en Bournemouth. La partoprenintoj de la aranĝoj en Londono kune forveturis al la kongresurbo Sabaton la sesan de Aŭgusto per speciala trajno. Nekutima bildo por multaj kontinentanoj estis, vidila "atendliniojn" (vostojn) de la pasaĝeroj en la grandaj stacidomoj britaj. La kvin-sescent Esperantistoj vekis la intereson ĉe la homamasoj en Stacio Waterloo. Gaja atmosfero, manpremoj, salutkrioj ni fakte jam troviĝis en la kongreso. Ĉio bone aranĝita sen formalajtoj. Agrabla servo estis la transporto de valizoj de la Royal-Hotel en Londono ĝis la stacidomo en Bournemouth. La kongreso bone sin anoncis, ni vidu la sekvon.

La Interkoniĝa Vespero

La Kongreslibro informas, ke pro manko de sufiĉe ampleksa salono en la kongresurbo, la ŝatata *Interkoniĝa* (tiel skribas la kongreslibro) devos okazi en tri diversaj lokoj. Ĉu plendi pro tio, aŭ ĉu ni ĝoju pro la alta nombro de la kongresanoj? Prefere la lasta. Kiel raportanto mi havis la privilegion iri al ĉiuj tri kunvenejoj, sed la renkonto de tiom da amikoj en la ĉefa ejo, salono de la kafejo *Bobby* ŝanĝis la planon. Malgraŭ la severa malabundo (*Austerity*!) reganta en postmilita Britujo la kongresanoj estis regalataj per trinkaĵoj kaj kukoj laŭ elekto! Bonega aranĝo tie, kiel en la du aliaj kunvenejoj *Plummer Roddis* kaj *Kafejo Allen*. La komenco en Londono estis bona aŭguro.

La Malfermo

La kulmina punkto de kongreso estas la malfermo, kaj ĝia senmakula evoluo decidas pri la kongreso, ĉu bona aŭ ne. Tial la organizantoj kun ioma antaŭtimo ĉiam rigardas ĉi tiun malfermon. Ni diru tuj, ke Bournemouth ne pravigis ĉi tiun rajtigitan senton. Kontraŭe, ĉio bone kaj glate evoluis.

Dimanĉon, sepan de Aŭgusto. Are alvenas la Esperantistoj, sub la scivola rigardo de multaj bangastoj, ĉe la Pavilono, la plej granda konstruaĵo proksime de la maro. Kutima bildo de kongres-aferoj, rapidantaj kongresoficistoj, gravmienaj komitatanoj, bruanta homamaso. La salonego estas plena, impona bildo agrabligita per multaj naciaj kostumoj de ĉarmaj samideaninoj. Eksidas la Estraro, Komitato, delegitoj. Kaj jen io tipe angla. Eniras altstatura, nigre vestita sinjoro solene portanta la signon de la aŭtoritateco, kaj anoncas la alvenon de la Urbestro, kiu estas en riĉa ruĝa kostumo. La angloj posedas la trajton eĉ en plej solena momento konservi ian humoran senton (el kio naskiĝis sendube la fama natura medikamento usona, la *Keep smiling* (t.e. *Daŭre ridetu*). Nu la Urbestro de Bournemouth gajnis ĉiujn per ĉi tiu simplanima, sincera sinteno, venanta rekte el la koro.

Eksonas la himno. Potence ĝi sonas tra la vasta salono, vibrigante la korojn de la kantantoj. Kelkaj eniraj salutvortoj de la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, S-ro J. W. Chambers, bonvenon al S-ino Wanda Zamenhof; kaj ekparolas la Urbestro de Bournemouth. Aŭdinte jam ofte anglalingvajn parolantojn kaj oratorojn, agrable min tuŝis la klara esprimmaniero de Sinjoro Urbestro, kiu, senkulpigante sin ne povi alparoli nin en Esperanto, bonvenigas la kongreson, ĝojas pri la belaj naciaj kostumoj, kaj esperas, ke liaj propraj pompaj roboj ne superombras ilin je koloro. Impresas lin la partopreno de tiom da blindaj Esperantistoj al kiuj li esprimis sian tre koran simpatian, des pli ĉar li mem aktive laboris en servo por plibonigi la sorton de la blinduloj. Lin ankaŭ agrable tuŝis la okazigo de diservoj, pruvo ke Esperanto-kongreso ne estas ordinara festo, sed manifestacio kun animo kaj sento. Je la fino de sia bonven-parolado, la Urbestro diris en Esperanto:

“Al vi Esperantistoj, kiuj akcelas per internacia lingvo la komprenon inter la popoloj, korajn salutojn! Britlando salutas vin, Bournemouth bonvenigas vin, kaj mi deziras al vi sukcesplenan profitdonan laboradon kaj agrablan restadon. Koran saluton al vi ĉiuj!”

Mallonge, simple kaj klare, jen mia opinio pri la bonven-parolo. Rimarkinda ja estas, ke ĉiuj bone komprenas la anglalingvan parolon, kiel pruvas la forta aplaŭdo de la kongresanoj.

Esprimas la dankon de la kongreso Sinjoro *Malmgren*, prezidanto de U.E.A. Tion sekvas la kutima enirparolado de la prezidanto de U.E.A. Aludante la kongreson en Malmö li demandas, ĉu la impulso, kiun donis la jara kongreso estis sekvata de konkretaj agoj? Pasis jaro kaj konvenas ekzameni la faritaĵojn. Malgraŭ la ombroj sur nia vojo, la neniel favoraj kondiĉoj sub kiuj ni vivas, ni tamen ne rajtas plendi. Respondante la demandon, la prezidanto opinias, ke la respondo estas pozitiva. Ĉie la aktivuloj penadas, kiel atestas la ŝatindaj rezultoj atingitaj en ĉiuj agadkampoj. Malgraŭ la ankoraŭ sentebraj sekvoj de la granda milito, la malordo ekonomia, la disigo de la mondo en du blokojn, nia laboro senŝancele iras sian vojon, eĉ ne tro ĝenata per la financaj komplikaĵoj, malebligantaj multon. Nia prezidanto konvinke akcentas, ke la fundamento de nia laboro estas la idealismo de la miloj kaj miloj da homoj, ne atentantaj la mokojn kaj kritikojn de malidealisma mondo. Resume ni plenrespondece povas diri: “Ni estas kontentaj pri la atingitaĵo.” Li aludas tipan okazaĵon. Amiko lia, sciante, ke li daŭre sin okupas pri Esperanto, miris pri tio. Estante “realeca homo” tiu ĉi amiko fine diris: “Nu por atingi tiom da videblaj rezultatoj via movado ja devas disponi pri kolosaj rimedoj!” Jen kiel la tiel nomita *afera realismo* konkludas.

Daŭrigante, la prezidanto ankoraŭfoje akcentas la modestajn rimedojn, kiujn ni efektive disponas kaj li forte atentigas, ke ĉi tiun mankon de *kolosaj* rimedoj kompensas la Esperantista idealismo, produktantaj la sennombrajn agantojn nesalajritajn. Estus tute neeble pagi ĉi tiun laboradon konstante plenumatan, ne ĉiam sekvatan de tuja sukceso. Al ili, la nekonataj soldatoj de nia paca armeo, ni devas danki, inter ili la multaj, kiuj ne povas ĉeesti la kongreson. La atingitaĵon dum la jaro post Malmö la Estraro resumis en mallonga raporto, aperonta kiel aldono al la kutima kongresraporto.

“Persisto donos al ni la venkon,” eldiras la prezidanto. “La kongreso estas la jara stimulo, la donanto de nova impulso kaj de kuraĝo. Apud la universalaj kongresoj okazas ĉiujare aliaj manifestacioj, naciaj kunvenoj, somerkursoj, Esperantistaj renkontiĝoj. Ĉiuj havas la celon konservi kaj plifortigi la flamon de la entuziasmo sen kio nenio estus. Kaj samtempe ĉi tiuj manifestacioj igas praktiki la lingvon, detalo ne forgesinda.”

La Universala Kongreso estas grava okazaĵo, emfazis la prezidanto. Hodiaŭ ludas en la movado gravan rolon la fakaj kunvenoj, ĉu en la kongreso mem, ĉu sendepende en aliaj lokoj. Li citas tian Esperantistan fakkunvenon en Danlando en kiu partoprenis ne malpli ol 130 fervojistoj el deko da landoj. Jen sekvinda ekzemplo. Alia agadkampoj

estas neesperantistaj kunvenoj kun partopreno de aktivaj samideanoj, kreantaj kvazaŭ celon de penetrado. La prezidanto mencias la okazigon de Kampad-kunveno (Camping Club-) en Fontainebleau, kiun vizitis kampadanoj el 19 landoj. Rezolucio favore al praktika uzado de Esperanto estis akceptata per 18 voĉoj kontraŭ 1.

Finante sian paroladon, nia simpatia prezidanto kore bonvenigas la ĉeestantojn kaj deklaras la kongreson malferma.

* * *

ĉi tiun "marŝal-bastonon" afable dankante la donacintojn. Li esprimas la deziron, ke per ĉi tiu martelo li povu anonci decidan venkon de nia afero. (Senhalta aplaŭdo).

Per tio finiĝas la eniro kaj la laboro komenciĝas per elekto de la kongresfunkciuloj. Kiel prezidanto de la kongreso estas unuanime elektata kun forta aplaŭdo

S-ro W. A. Gething,

Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio



Lia Moŝto La Urbestro de Bournemouth
Kons. Leŭt.-Kom. J. H. Turner, J.P.

Interlude prenas la parolon Jan Strönne, nia dinamika sveda aganto, prezidinto de la 33-a. Li transdonas la salutojn de la bravaj samideanoj en Malmö tiom bone plenumintaj sian taskon. Por pruvi, ke la Esperantistoj ne nur estas homoj plenaj je idealismo, li transdonas nome de la samideanoj en Malmö

prezidantan martelon

al la prezidanto. Kaj efektive tia instrumento mankis ĝis nun. Fiere S-ro Malmgren akceptis

kiel Vicprezidanto

S-ro J. W. Chambers,
Prezidanto de Loka Kongresa Komitato

kiel Ĝenerala Sekretario de la kongreso

S-ro C. C. Goldsmith, sekretario de U.E.A.

kaj kiel vic-sekretario.

S-ro O. T. Nicolaisen, konstanta kongres-sekretario.

S-ro Gething okupas la prezidantan seĝon, dankas tutkore pro la farita honoro, aludas ke



S-ro W. A. Gething
Kongresprezidanto

prave ĉi tiu tasko devus aparteni al la multe laborinta prezidinto de la Brita Asocio, F-ino Margaret Jay, kiu dum sep jaroj sindone laboris por nia afero. Li ĝojas, ke li havas apud si tiel kompetentajn agantojn, kiel estas samideanoj Goldsmith kaj Nicolaisen. Li ĝojas pro la partopreno de Sinjorino Wanda Zamenhof, vivanta ligilo kun nia Majstro.

Informante pri la artfajraĵoj okazontaj hodiaŭ vespere je nia honoro, la prezidanto sprite esperas, ke niaj paroloj estos brilaj kiel la raketoj. La enirparoladon de la prezidanto sekvas la tradiciaj salutoj de

Registaraj delegitoj

Aŭstralio : F-ino D. Dash

Brazilo : Senhor Mario Guimarães, *Ministro-Konsilanto al la Brazila Ambasadorejo*

Belgujo : D-ro P. Kempeneers (*nome de la Ministerio por Instruado*)

Ĉeĥoslovakujo : S-ro A. Malík (*nome de la Ministerio por Informoj*)

Italujo : Pastro M. Caroli

Nederlando : S-ro Ing. J. R. G. Isbrucker

Norvegujo : S-ro R. Bugge-Paulsen

Svedlando : S-ro Rektoro K. Söderberg

Svislando : S-ro Legacia Sekretario Lindt (*nome de la Svisa Federala Konsilantaro—Svisa Centra Registaro*)

Fortega aplaŭdo salutas **Sinjorinon Wanda Zamenhof**, kiu, videble emociita, deziras bonsukceson al la kongreso en la nomo de la familio Zamenhof.

La Urbestro de Bournemouth, atente sekvinte la metodan sinsekvon de la kongresa proceduro forlasas la salonon. La kongreso ekstaras.

Sekvas la tradiciaj salutoj de la Delegitoj de la Landaj Asocioj. Ĉiu Delegito rajtas paroli dum unu minuto kaj post lia saluto li indikas la nombron de la subskriboj por la petskribo en sia lando. La sumo de ĉiuj ciferoj nombriĝas je

16,350,212

Argentina Ligo : S-ro T. Sekelj

Aŭstralia Asocio : S-ro J. Hawks

Aŭstria Federacio : S-ro G. Katzianka (*kiu samtempe informis pri la apero de la alloga poŝtmarko honore je Esperanto*).

Belga Ligo : D-ro P. Kempeneers

Flandra Ligo : F-ino De Cock

Brazila Ligo : D-ro Camozato

Brita Asocio : S-ro J. R. Grocott

Ĉeĥoslovaka Asocio : S-ro O. Ginz

Ĉinaj Esperantistoj : S-ro Chun-Chan Yeh

Dana Ligo : D-ro H. Egerrup

Egipta Asocio : S-ro Tadros Megalli

Finnlandaj Esperantistoj : S-ro Joel Vilkki

Franca Unio : S-ro G. Warnier

Germana Asocio : Redaktoro Teo Jung

Irlandaj Esperantistoj : S-ro L. OhUiginn

Islandaj Esperantistoj : S-ro T. Halldorsson

Itala Federacio : S-ro P. Miazzi

Jugoslavia Federacio : D-ro I. Lapenna

Kanadaj Esperantistoj : S-ro H. P. Devenish

L.E.E.N. (Nederlando) : F-ino H. Mulder

Norvega Ligo : S-ro O. Thormodsen

Novzelanda Asocio : F-ino M. R. Brown

Pola Asocio : S-ro R. Sakowicz

Sveda Federacio : S-ro Jan Strönne

Svisa Societo : S-ro O. Walder

Usona Asocio : S-ro W. G. Adams

Kun dankvortoj de la prezidanto de la Kongreso, finiĝas la malferma kunsido de la 34-a.

(Parenteze : Ĉar devas esti evidente la sorto de niaj kongresoj, ke iu nepre devas fuŝi bone aranĝitan aferon, jen la kanada delegito opiniis interese veni en speco de karnavala vesto multkolora. Tiu faro makulis la tuton, kaj estontece oni invitu tian kongresanon, forlasi la salonon aŭ sin aranĝi dece kaj konforme al la situacio.—La promenanto).

La laborkunsidoj

London, 8-an de Aŭgusto okazis la unua laborkunsido de U.E.A. prezidata de S-ro Malmgren. Post enkonduka parolo de la prezidanto, D-ro Lapenna informas pri la organizo de la oratora konkurso inter la junuloj. Rajtas partopreni ĉiu kongresano ĝis 30-jaraĝa. La parolado estos taksata laŭ stilo kaj formo, scio pri la lingvo, originaleco de la ideoj esprimataj kaj efikeco laŭ oratora tekniko, t.e. sinteno k.t.p. La plej alta ŝtupo kaj sekve unua premio estas 35 poentoj minimume (ĉiu ero de la prijuĝo kalkulas po dek poentoj, sekve la maksimumo estas 40 poentoj). Komisiono tripersona decidas tuj post la konkurso pri la valoro.

Estas la vico de la salutparoloj, de unuopaj organizaĵoj, kaj lego de la saluttelegramoj kaj leteroj. Salutas la kongreson :

Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.) : S-ino Alamo-Sandgren

Universala Ligo : F-ino M. H. Vermaas

Esperantista Akademio : S-ro J. R. G. Isbrucker, prezidanto de E.A.

Internacia Instruista Kunlaboro : S-ro E. Dahl.

La prezidanto legas telegramon kaj leteron de Generalo Bastien, kiu senkulpigas sin pri neĉeesto en la 34-a Kongreso. Li deziras bonan sukceson al la kongreso. La prezidanto proponas sendi saluttelegramon al la du honor-prezidantoj Gen. Bastien kaj S-ro Kursteiner. La kunsido aplaŭde aprobas.

D-ro I. Lapenna deziras klarigon pri la rezolucio proponita de Universala Ligo kaj sendota al la Federalisma Kongreso en Stockholmo. La dirita teksto estas ekzamenota en la kunsido de la U.E.A.-komitato. La ĝenerala sekretario konigas nun la telegramojn kaj leterojn ricevatajn. Pro la konsiderinda nombro estas citataj nur la nomoj de la sendintoj :

Asocio de Esperantistoj en Pollando ; Jugoslaviaj Esperantistoj kunvenintaj en Sibenik ; Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda ; Rumana pioniro de Esperanto,—Henriko Fisher,—en Insulo Cipro ; S-ro Rehak Feant, Nové Mesto nad Vahno ; S-ro Kurt Grohall, Berlin ; Esperanto-grupo Kolono ; Artistino M. Sautreuil, Parizo ; S-ro Gabriel D. Lewis—partopreninto en la unua kongreso ; S-ro E. Dahlmann, Berlino ; Urbestro de Graz, Aŭstrujo, invitanta la kongreson por unu venonta jaro, S-ro Saalfeld en Tangermunda, S-ro Penko Oetrov en Jambol, Bulgarujo ; S-ro Georg Walker, York ; Landestro de Stirio, Graz ; Familio Fischer Bern ; Barcelonaj samideanoj ; S-ino Elizabeth Pötzl, Jena ; S-ro G. Gerhardt, Greiz, Germ. ; S-ro Kilu kaj S-ro Yank en Hongkongo ; S-ro Thompson, Ohakunenz ? ; D-ro K. Bade, Wetter, Germ. ; S-ro Vilén Tláška, Karlovy-Vary ; S-ro Crowe, Coburg, Aŭstralio ; S-ro V. Pinagel, Unkel-Rhein ; Regiona Katedro de Esperanto, Trieste ; S-ro Rich. B. Belcher, Blackley ; Karavano Esperantista el Brno ; S-ro I. Alvarez, Bilbao ;

S-ro Schickfluss, Schw. Gmünd, Germ. ; Internacia Federacio Esperantista, Amsterdam ; Esperantistoj en Udine, Ital. ; S-ro Marcel Bosc Normandujo ; Landa Organizo Esperantista, Supra Aŭstrujo ; Esperanto-grupo, Linz ; S-ro P. Balkanyi, Budapeŝt ; F-ino Julie Šupichová, Praha ; Hamburga Societo Esp-ista ; Tutmonda Junular-Organizo, Itala Sekcio, Reiste ; S-ro P. Christaller, Stuttgart—90-jara pioniro ; Japana Esperanto-Instituto, Tokio ; D-ro Olšvanger, Jerusalemo ; S-ro Kohen-Cedek, Jerusalemo ; Asocio de Laboristaj Esperantistoj, Amsterdam ; Scienca Revuo, Soest ; Esperanto-Asocio en Firenze ; Berna Esperanto-Societo ; Portugalaj Esperantistoj, Lisboa ; Korea Esperanto-Instituto, Soeul ; D-ro Julian Zamenhof, York—esprimanta bedaŭron, ke pro profesiaj devoj ne povas ĉeesti ; kaj fine **Ludoviko Zamenhof**, nepo de la Majstro, telegrafis : “Dezirante al la kongreso fruktodonan laboron, salutas samideane ĉiujn kongresanojn.” (forte aplaŭdata).

Post ĉi tiu vico de salutoj sekvas la legado de la Raporto de la Estraro de U.E.A. La Komitato decidis, ke se eble la Raporto aperu en la raporto



S-ro J. W. Chambers
Prezidanto de L.K.K.


de la Kongreso. La ĝenerala sekretario informas pri neokazo de la prelego de Prof. St. Ĝuĝev kaj pri raporto de la B.B.C. (radio-istanco) pri la kongreso.

Por la Serva Centro de U.E.A. en Ĝenevo parolas ĝia administranto, **Hans Jakob**, esprimante la dankon al la Brita popolo heroece rezistinta en la jaro 1940, ago sen kiu ni eble ne kunvenus en kongreso. Li informas pri la laboroj de la Serva Centro, petas indulgon pro okaza silento flanke de la administranto kaj fine komunikas la

subitan morton de agema laboranto, **Rudolf Michael Frey** en Vieno. "Samideano Frey, multe peninta por Esperanto kaj ege por la efektivigo de la eldono de honora poŝtmarko de Esperanto, subite mortis". La mortanonco estis afrankita per ĉi tiu poŝtmarko, vere sort-ironio.

Kompletigas ĉi tiun informon samideano **R. Sakowicz**, kiu sciigas siajn proprajn spertojn refutante asertojn de grava funkciulo pola de Unesco, aperintajn en pola gazeto.

S-ro Ege, Danlando, invitas danki la Ministerion Danan pro la eldono de la Esperantlingva filmo.



Ci tiun belan poŝtmarkon ni ŝuldas al la konstanta intereso de la ĝeneral-poŝtdirektoro en Aŭstrujo, D-ro Dworschak, kiu siavice persvadis la Aŭstran Poŝtan Administracion eldoni ĝin. La ĉi-supra reproduktaĵo estas sendita el Graŝ dum la tiea Kongreso kaj estas nuligita per speciala stampilo.

La prezidanto petas, ke oni honoru la forpason de Samideano Frey per duminutaj staro kaj silento.

La parolo nun estas al **S-ro E. D. Durrant**, kiu informas pri la klopodoj ĉe Unesco. Tiu ĉi organo de U.N. deklaris, resti firme neŭtrala en la demando pri Internacia Lingvo. Unesco faris proponon iam kunvoki spertularon por ekzameni la demandon. Tiukaze ni, Esperantistoj, postulas, ke ni estu reprezentataj per homoj kompetentaj el niaj vicoj. En la tuj proksima tempo nenio okazos en ĉi tiu direkto; la statuto de Unesco ne rajtigas ĝin agi memstare en tiel grava demando.

S-ro C. Evans pledas ke oni atentu la propagandon inter la anoj de Islamo.

S-ro R. Rossetti esprimas dankon al S-ro Durrant pro la pozitiva laboro kaj atentigas pri kulturaranĝoj Esperantistaj por neesperantista publiko ekzemple, literaturaj konkursoj, muziko, arto, ekspozicioj.

Nesolveblan problemon en la nuna tempo tuŝas samideano **A. Labit**, koncerne la akcepton de aliĝoj al la kongresoj flanke de anoj en valut-malfortaj landoj. Demandas, kio estas farita por akceli la venon de kongresanoj el orientaj landoj.

S-ro Goldsmith insiste atentigas pri la komplikaĵoj en la nuna tempo transigi monon de

unu lando en alian. Nun estas pli ol dudek landoj, kiuj interesas nin, kaj de kiuj transpago estas neebla. Ĉi tiu situacio ne estas ŝanĝebla per deziresprimo nek plej bona volo de la interesatoj. Tio estas sekvo de la milito kaj de ties profundaj ŝanĝoj.

S-ro E. Midas petas parolon kaj raportas pri la laboro por nia lingvo en la kadro de Internacia Amikeca Ligo.

S-ro E. Pugno transdonas la salutojn de la Itala Esp.-Federacio kaj atentigas pri la rezolucio favore al Unuigita Eŭropo. Demandas, kiu kunlaboras al la celo krei unuigitan Eŭropon?

S-ro Rossetti demandas kial Hungarlanda Societo Esperantista ne estas ano de U.E.A., citas malaperon de delegito de grava loko Aŭstra al la jarlibro.

Respondas la sekretario de U.E.A. atentigante, ke tio estas tipa ekzemplo de la malordo reganta en certaj Esp. organizaĵoj. Li plurfoje skribis al la Hungara organizaĵo sed ne ricevis respondon. Saman rimarkon li devas fari pri la estinta Ĉefdelegito de U.E.A. en Aŭstrujo, kiu same persiste silentis.

S-ro P. Petit insistis, ke oni serioze klopodadu ĉe la Eŭropa Parlamento, kies sidejo estas en Strasburgo. Invitas la anojn de la okcidentaj landoj en la kongreso kunveni Mardon vespere por informa kunveno en la Urba Domo.

S-ro J. D. Applebaum demandas, kial ni nenion diras en nia revuo pri S.A.T. kaj ĝia kongreso en Parizo, pri kiu li aŭdis bonan raporton en radio.

S-ro T. Jung atentigas, ke pri la Eŭropa Parlamento aperis informo en la Esp. gazetaro, ke interalie la Itala Parlamento faros proponon pri Esperanto en Strasburgo.

Fine F-ino M. Noll resumas la spertojn pri propagando kaj konvinke konkludas: Esperanto ekzistas!

Je la 12.20 Prezidanto Malmgren fermis la kunvenon.

Dua laborkunsido

Urba Domo, Mardon 9-an de Aŭgusto. Temo: La rolo de la junularo en la movado kaj la metodoj altiri ĝin grandskale al Esperanto.

Estis certe bonega ideo kunigi ĉi tiun tre gravan problemon kiel gajni la junularon kaj la rilatan diskuton kun la oratora konkurso.

Malfermante la kunvenon, la prezidanto de U.E.A. invitas la delegitojn de Landaj Asocioj Esperantistaj partopreni kunvenon de la komitato de U.E.A. por diskuti la temon: *Oficialigo de Esperanto.*

La salono estas plena, supraĵa takso fiksas la nombron je 650 ĉeestantoj. Kaj komenciĝas la

oratora konkurso. Enskribiĝas kvin partoprenantoj: F-ino **I. M. Adamson**, S-roj **Smith, Labit, Atkinson** kaj **Sullivan**.

D-ro Lapenna resumas ankoraŭfoje la manieron de juĝado: kvar ĉefaj karakterizaĵoj, ĉiu kun dek poentoj, nome: idea, lingva, stilo-forma kaj laste, sintena. Por ricevi la unuan premion, necesas minimumo de 35 poentoj.

Ĉiu oratoro evoluigas la temon laŭ sia maniero kaj la publiko atente aŭskultas. La juĝantaro retiriĝas por ekzameno. Dume la diskutoj daŭras. S-ro Midas denove parolas pri la Amikeca Ligo.

Eniras la juĝantaro de la oratora konkurso. D-ro Lapenna en sia klara maniero prezentas la juĝon, laŭ kiu neniu el la kandidatoj rajtas ricevi la unuan premion. La dispartigo estas la jena: S-ro Labit (30 poentoj), F-ino Adamson (29p.), kaj S-ro Smith (25p.). Kaj la tri premioj sekvas la saman ordon—1, 2, 3. La disdono de la premioj okazos en la tria laborkunsido. Ĝenerala aplaŭdo honoras la gajnintojn.

Sekvas ankoraŭ diversaj komunikoj pri fakaj kunvenoj kaj la kunveno finiĝis je la 12-a.

Tria laborkunsido

Urba Domo, Vendredon, 12-an de Aŭgusto.

Temoj: *La Delegita Servo de U.E.A.; Raportoj de Fakaj Asocioj.*

Antaŭ malfermo de la kunveno, la sekretario de U.E.A. legas respondon de la Honora Prezidanto de U.E.A., Hans Kursteiner, kiu dankas pro la telegramo kaj deziras bonsukceson al la kongreso. (Aplaŭdo).

Krome, telegramo de la Aŭstra Ministro, Sinjoro Schmid en Londono estas komunikata, per kiu li deziras sukceson al nia movado. (Forta Aplauĉo).

La sekretario informas pri la prelego kun lumbildoj (Kolorfotografado) okazonta en Alexander Hall, St. Peter's Road.

S-ro Malmgren en enira parolo pri la temo diskutota, atentigas interalie, ke la Jarlibro de U.E.A. ne estu konsiderata kiel nomaro de korespondemuloj. Invitas, ke oni esprimu sin pri la temo. Ĉar neniu sin anoncas, prenas la parolon

S-ro Mason Stuttard, skizante la servon de delegito. Ĉi tiu servo estas unika, nekomparebla kun io ekzistanta en iu alia lingvo. La opinio, ke la angla lingvo estas la monda kaj universala lingvo kaj kapabla plenumi samajn servojn ja bazas sin sur tute alia percepto. La delegito estas kvazaŭ Konsulo, tamen ne konsulo oficiale ŝtata (sekve burokrata!) sed plivere amika konsilanto ligata al la demandanta membro per komuna idealo. Plenumante utilan servon la Delegito konkretigas la idealon, sekve oni ne

misuzu lian servemon. Aliflanke devas esti certa selekto en la nomigo de la Delegitoj. Ne ĉiu taŭgas esti la konfidulo de U.E.A. La baza ideo de la delegita sistemo estas la servado al la membroj. Finante, la parolanto invitas je konkretaj sinesprimoj.

S-ro Goldsmith siavice citas aron da ekzemploj de servpeto, miskompreno pri la rolo de la servokuponoj (pruvo de membreco) kaj respondkuponon (pago por afranko).

S-ro Midas kiel kelkjara delegito de U.E.A. ĉefe akcentas la valoron de la jarlibro kaj opinias, ke U.E.A. estas la enkorpiĝo de la Esperantomovado. Emfazas, ke tio, kion li plenumas kiel Delegito, estas nur ebla, ĉar li scias, ke post li troviĝas la firma muro de la Esperantismo—U.E.A.

aliĝinta (membrokarto, servokuponaro, jarlibro) okazas tiom malrapide. Je tio la ĝenerala sekretario de U.E.A. respondas ke la servado en la unuopaj landoj dependas de la ĉefdelegito sed ne ĉiuj laboras same akurate. En landoj plene organizitaj, kiel ekzemple en Britujo, la livero de dokumentoj al la aliĝintaj anoj okazas sen prokrasto, kelkajn tagojn post la ricevo de la aliĝo.

Por reveni al la temo, S-ro Evans deklaras, ke delegito estu kompetenta kaj la honorindeco estu ne la ĉefa kriterio en la elekto. Faka delegito estu efektive fakulo sed ne amatoro, opinianta esti kapabla doni seriozan informon. Insistas, ke faka delegito okupu nur unu fakon, sed ne plurajn.

Kontraŭan opinion esprimas malnova spertulo



S-ro G. Kühlmann (Kopenhago) kritikas kelkajn malglataĵojn en la redakto de la dana parto de la jarlibro. Temas pri malsama skribmaniero de loknomoj danaj.

S-ro **Oliver** rimarkigas je la statuto de U.E.A., kiu klare precizigas la rolon de Delegito, devojn kaj rajtojn. La Delegito respondecas unuflanke kontraŭ la membroj kaj aliflanke kontraŭ la Estraro/Komitato de U.E.A.

Respondante al la plendo de S-ro Kühlmann, la ĝenerala sekretario de U.E.A. atentigas, ke ĉi tiu fuŝo estas ŝuldata al malpreciza kaj malsama prilaboro de la dokumentoj flanke de la enlandaj organoj de U.E.A., ĉefdelegitoj-delegitoj. Li invitas, ke oni evitigu al la Centra Oficejo temporaban serĉadon skribante loknomojn kaj nomojn nacilingve, sed ne en Esperanto aŭ eĉ traduke. Li citas la ekzemplon de Novkastelo, ekvivalento de Newcastle. Tio ja estas komprenebla por anglo, sed oni ne povas postuli, ke en simila okazo la kompilanto de la jarlibro konu ĉiujn lingvojn.

Tial, ke estas la vico de la plendoj, S-ro Kühlmann demandas kial la servado al la membro

en la afero, **S-ro Otto Ginz** el Praha, kiu kiel longjara delegito de U.E.A. sin okupis pri la plej diversaj aferoj. El lia sperto li konsilas, elekti lertajn homojn, kiuj scias sin aranĝi, elturniĝemajn. Ne decidas la *faka* kono, sed la *maniero* laŭ kiu oni prilaboras informpeton.

Por fini, S-ro Goldsmith atentigas, ke por plenumi ĉion, kion oni deziras, necesus okupigi pliajn oficistojn. Dum jaroj li sin dediĉis al Esperanto kaj al U.E.A. oferante libertempon kaj ripozon al la afero. Vidante ion pretan, nur malmultaj personoj havas klaran percepton, kiom da detaloj necesas por konkretigi tion. Li konklude ne vidas praktikan utilon en la ripeta presigo de malsamaj loknomoj, afero kiu ankaŭ kostus.

Estas la vico de la raportantoj de la fakaj kunvenoj. Parolas sinsekve :

S-ro **E. Adamson** (Ĵurnalistoj) ; S-ro **K. Young** (Sciencistoj) ; F-ino **Vermaas** (Universala Ligo) ; S-ro **M. Stuttard** (Literatur-amantoj) ; S-ro **A. A. Ager** (Kooperativa movado) ; S-ino **H. de Vere** (Socialdemokratoj) ; S-ro **A. H. Middlemast** (Blinduloj) ; S-ro **E. Dahl** (Instruistoj).

Ĉiuj legas raporton. Pro la amplekso de ĉi tiuj dokumentoj *Esperanto* konigos la enhavon en sekvonta numero.

La prezidanto per kelkaj kuraĝigaj vortoj dankas la raportintojn akcentante la gravon de la fakoj.

Sekvas nun la premiado de la gajnintoj en la konkurso. D-ro Lapenna en la nomo de la Komisiono transdonas al la tri laŭreatoj

S-ro **Labit** : Ekzempleron de *Plena Vortaro*

F-ino **Adamson** : *Leteroj de Zamenhof* (unua volumo)

S-ro **Smith** : *Kataluna Antologio*

• Manpremane kaj afable ridetante al la premiitoj, D-ro Lapenna finas sian taskon. (Aplaŭdo).

retiri unu, sed insistas, ke oni faru tiun al la Dana Ministerio rilate al la Esperanta filmo.

S-ro Malmgren en ĝenerala maniero atentigas, ke ne estas eble al niaj organoj sendi dankesprimon al ĉiuj organizaĵoj Esperantistaj sukcese laborintaj en iu fako de nia vasta agado. Ni devas konservi certan limon, diktitan de tempo kaj rimedoj.

Petas la parolon Hans Jakob, por legi leteron de U.E.A.-pioniro, **Paul Blaise**, unu el la lastaj komitatanoj el la heroeca tempo de U.E.A. 1908–1912. Malsana, Blaise ne povas ĉeesti la kongreson sed salutas ĉiujn amikojn plej kore kaj sincere.

Alproksimiĝas la fino de la lasta laborkunsido kun kutimaj informoj. **S-ro Roland Dupuis**, en la nomo de la Sveda Eldona Societo, informas, ke aperos speciala prikongresa numero simila al tiu



La prezidanto transdonas la parolon al oficiala delegito de la Ĉeĥoslovaka Ministerio por Informoj, **S-ro A. Malík**, kiu peras la salutojn de tiu Ministerio, tre interesita pri la praktikaj servoj de nia lingvo. Pro teknikaj kaŭzoj la parolanto ne povis atingi Bournemouth ĝustatempe, sed sprite opinias, *pli bone malfrue, ol neniam*.

Por la Esperantistoj en Ĉeĥoslovaka Respubliko kaj la Asocio de Ĉeĥoslovakaj Esperantistoj parolas nun samideano Ginz, nia konata idepraktika delegito kaj kunlaboranto. Li atentigas pri la grandega intereso je nia afero, pri la bone sukcesinta kongreso en Liberec, la atentinda kresko de la membraro, kaj la ĝis nun neniam antaŭe atingita disvendo de libroj en sia lando. Malgraŭ ĉiuj baroj de la nuna situacio, malhelpoj ja ĉie ekzistantaj, Esperanto gajnas la korojn. Ĉeĥoslovakujo konservos sian lokon en la Esperanto-movado.

La prezidanto donas la parolon al F-ino Vermaas, kiu en la nomo de la Universala Ligo retiras la de ŝi proponitan rezolucion.

S-ro Ege, proponinte dankesprimojn flanke de la Kongreso kaj Estraro de U.E.A., konsentas

aperinta pri Malmö.

S-ro Marcel Lewin, Esperantista veterano, kolektas la nomojn de ĉeestantaj veteranoj aliĝintaj al Esperanto antaŭ la jaro 1910. Petas, ke ili kolektiĝu antaŭ la urbdomo por komuna fotografado.

Fino de la kunsido 12.20.

La Somera Universitato

Ĉi tiu interesa ero de la kongreso, kreita en jaro 1925 laŭ iniciato de D-ro E. Privat, estas laŭ mi certe la plej alloga ero en la kongreso. Tiom pri la temoj, kiom pri la prelegintoj.

La kongreslibro anoncas prelegojn pri kaj de :
Demokrata Edukado—*Rektoro K. Söderberg, Uppsala.*

U.N.E.S.C.O.—*S-ro E. D. Durrant, Reigate.*
La Detektive-romano — *Prof. G. Waringhien Tours.*

Kiel kreskas kaj disvastiĝas la lingvoj ?—*Prof. Guĝev, Sofia.*

La Internacia Kortumo kaj ĝia rolo en la interŝtataj rilatoj—*D-ro I. Lapenna, Zagreb.*

Internaciaj edziĝoj kaj privata internacia juro—
D-ro E. L. Johnson, Durham.

Kolorfotografado (kun lumbildoj)—D-ro D. R. Duncan, London.

La slovakaj stalaktitaj grotoj (kun lumbildoj)—
D-ro L. Izak, Turĉ. Sv. Martin.

La gramatika strukturo de la angla lingvo kompare kun tiu de Esperanto—Prof. W. E. Collinson, Liverpool.

Frederiko Chopin (kun muzika prezentado)—
Roman Sakowicz, Nowa Sol.

Artistoj de la Itala Renesanco—Reto Rossetti, Troon.

Simfundoj en la hejmo—D-ro P. Neergaard, Kopenhago.

Tio estas 12 prelegoj, el kiuj ne povas okazi 2, tiuj de D-ro Izak kaj D-ro Ĝuĝev, Feliĉe la kongresanoj povas ricevi anstataŭan prelegon, faratan de **S-ro Tibor Sekelj**—fama esploristo argentina—pri *Montgrimpado en la Andes*.

Altiras min la juraj prelegoj. Mi konfesas, ke min agrable surprizas unue la nombro de la atentemaj aŭskultantoj kaj due la perfekta, modela prezento de la temoj. Estas senkontesta plezuro aŭdi D-ron Lapenna, unuigantan en si la klaran juriston, la brilan preleganton kaj la temperamentan Esperantiston. Oni ne scias, kion plej akcenti, kaj eĉ se unu el ĉi tiuj kvalifikoj mankus, la prelego nenion perdus je valoro.

Kontraste, post nia energiplena sudslavo, gestoriĉa kaj nerva, la angla juristo D-ro Johnson prelegas pri temo iom aparta. Distance kaj humorplene, la specife angla maniero en internacia sfero, kompreneble al ĉiuj, la nomita preleganto montras la diversajn aspektojn de ĉi tiu speciala problemo, kia estas la internaciaj edziĝoj kaj ilia pozicio en la privata juro. Oni eble kredas, ke juro estas io teda, enuiga, ĉiuokaze evitinda kaj lasinda al la juristoj. Sed se ĉiuj profesoroj pri juro same elegante, agrable kaj alloge prelegus, la jura scienco multon gajnus en laikaj rondoj.

Mi forlasas la prelegojn kun efektiva gajno kaj laŭ la konversacioj, kiujn mi aŭdas, simile estis ĉe la ceteraj aŭdintoj.

Miaj redaktoraj devoj feliĉe permesas al mi ĉeesti la prelegon de S-ro Rossetti. La itala renesanco estas tia fenomeno en la homa kulturo, ke oni devas danki al nia samideano, ke li prezentas bildojn kun tre bone konceptitaj klarigoj. Flua parolo, simpatia parolanto harmonie kompletigas la tuton.

Laŭ tio, kion mi aŭdas pri la ceteraj prelegoj, ili ĉiuj kontentigas la vizitintojn. Mi aldonu nur la bedaŭron, ke la organizaj kaj redakciaj devoj malpermesas al mi ĉeesti aliajn prelegojn. Konsilinde estu, ke ankaŭ ni, komitatanoj kaj funkciuloj de la movado, povu profiti iom de la kongreso.

Distraĵoj

Oni saĝe procedis, aranĝinte unu tagon por ekskursoj (*Ĵaŭdon la 11-an*). Okazas kvin malsamaj. Redaktante la tekstojn por la gazeto la raportanto restas en sia ĉambro kaj martelas la skribmaŝinon. Certe la krozado al Insulo Wight sur la belega ŝipo *Emperor of India* lasis neforgeseblajn impresojn al la partoprenintoj. Same la veturo al Salisbury kaj la pririgardo pri la fama Stonehenge. Aliaj ekskursoj estis al najbara urbo Poole, al la Nova Arbaro kaj al la haveno Southampton.

La saman tagon okazas la tradicia balo, ĉi-foje en du lokoj—la Paviliono kaj la Urba Domo. La dancemuloj multe profitas de tiu ĉi vespero. Ĉeestas la balon ankaŭ la Urbestro kun sia edzino kaj ambaŭ estas tre amuzataj je la gaja atmosfero reganta. Grupo de naci-kostumvestita dancantoj linie preterpasas la Geurbestrojn.

Menciinda estas la Urbestra akcepto de la komitatanoj en la Paviliono ĉe lunĉo. Mi estas en embaraso; se mi diras, ke la lunĉo estas bonega, legantoj povas opinii, ke la redaktoro pensas nur pri la bona manĝo. Sed ĉio estas bona: akcepto, lunĉo, atmosfero amikeca.

La Varieteo bone sukcesas kaj ĉiun apartan prezenton koloras la prezentado de la oficialaj anoncistoj: lunde S-ro **W. A. Gething**, marde S-ro **E. Dahl** kaj merkrede S-ro **Mason Stuttard**. Elstaraj por la eksterlandaj kongresanoj estas la trupo de sonorilistoj—gejunuloj, kiuj daŭrigas tradicion etendiĝantan malantaŭen en la historion de la angla folkloro. Impresas ankaŭ la telepatia prezento de **Rayanne** kaj ŝia kunlaboranto, precipe pro la fakto, ke ili eklernis Esperanton antaŭ nur kelkaj monatoj specife por ĉi tiuj prezentoj. Tamen ĉiuj eroj estas bonegaj—Fino **Larrad**, S-ino **Nordling**, **LoBo** kun sia tirharmoniko, la **Bristolaj gesamideanoj** en mal-longaj skeĉoj, la dancistinoj, kaj samideano **Roland Dupuis**, kiu rolis ĉe la piano.

Kvazaŭ por konsoli la kongresanojn, okazas Vendredon vespere granda koncerto de la fama Urba Orkestro en la Winter Gardens. Alloga programo: Verkoj de Rossini, Schubert, Grieg, Elgar, Délibes, Eric Coates. La partoprenantoj neniam forgesos tiun belan kongresfinon, kaj mi aldonu, ke la Esperantistoj rajtas fieri pri sia samideano-virtuozo, **Frank Merrick**, kiu lavas ĉiujn ĉe la piano.

Kalejdoskopas pasas antaŭ miaj okuloj la tuta kongressemajno. Ĉarma urbo tiu ĉi Bournemouth, vera ĝardenurbo kun freŝa aero de la proksima maro. Kora atmosfero tute konforma al la senpasia angla maniero. Aferaj diskutoj, nenia parolo ofenda. Ĝusta mezuro en la plezur-aranĝoj kontraŭe iom tro multe da laborkunsidoj, kiuj tamen estas bone vizitataj.

La fermo

Devigata forveturi pli frue, mi lasas la parolvicon al la helpredaktoro, kiu resume reportas pri la fermo de la kongreso.

Sabaton, 13-an je la 10-a horo. La salono de la Urbdomo estas plenplena. Oni diras, ke en neniua alia kongreso tiom da personoj venis por la fermo. Prezidas S-ro Gething. Antaŭ ol komenci la veran aferon de la kunsido, oni laŭtlegas proteston, ke kunvenintaj okcident-eŭropanoj sendis komunikaĵon sur oficiala kongresa skribpapero al la samtempe kunsidanta Parlamento de Eŭropo en Strasburgo. Tio estas rompo de la neŭtraleco de la kongreso.

D-ro P. Kempeneers resumas la laborojn de la Estraro kaj Komitato, el kio evidentiĝas, ke dum la kongresanoj sin distris, la oficistoj de U.E.A. diligente laboradis. Interesa informo estas, ke ĉeestis komitatkunsidon 2 reprezentantoj de la Instru-Ministerio por observi.



F-ino Adamson kaj la redaktoro de *Esperanto*

Diversaj komisionoj tiucele elektitaj, faris al la komitato siajn respektivajn raportojn pri Financoj, Gazetoj, Kongresaj Rezolucioj, Esperanto-semajnoj, kaj la komitato konsideris la raporton de la Estraro kaj absolvis ĝin rilate al la farita laboro dum la pasinta jaro. La komitato faris rezolucion pri kunlaboro kun Unesco kaj dankis al S-ro Durrant pro lia valora perado. D-ro Kempeneers anoncas, ke la komitato elektis S-ron **H. Thilander** en Svedlando kaj S-ron **E. Archdeacon** en Francujo Honoraj Membroj de U.E.A. pro multjara kaj diligenta laboro sur la kampo de la Esperantismo. (Varma aplaŭdo). Pro malfaciloj en la ĝisnunaj aranĝoj por la blinduloj la komitato decidis, ke estontece la blinduloj devos aliĝi al U.K. pere de la landa asocio se tiu ekzistas en ilia lando. Komisiono rekomendis, ke estu konstanta komitato por prizorgi la prelegojn en la S.U. Oni konsideris proponon de R. Rossetti pri ekspozicioj kaj folkloraj elmontroj en estontaj U.K. kaj krome ekzamenis proponitan budĝeton por la venontjara U.K. en Parizo.

La estraro decidis dividi sin laŭ maniero de registaro kun *ministerioj* kaj ĉiu estrarano estos respondeca pri specifa fako jene: S-ro Malmgren—ĝenerala superrigardo (ĉefministro); S-ro Oliver—financoj; S-ro Jakob—gazeto; S-ro Petit—U.K.; S-ro Kennedy—propagando de U.E.A.; D-ro Lapenna—konstituciaj aferoj; D-ro Kempeneers—kulturaj aferoj kaj ĝenerala viculo de la prezidanto. La opinio estis esprimita, ke la komitatanoj rolu kiel interligaj instancoj inter la centra organizaĵo kaj la landaj asocioj.

La kongresprezidanto esprimis sian dankon al S-roj Malmgren kaj Goldsmith pro la farita laboro, kaj al D-ro Kempeneers pro la konciza tamen informa raporto.

S-ro Durrant laŭtlegas gravan saluttelegramon de **S-ro Hardman, de la Ministerio de Instruo**, kiu estas gvidanto de la brita delegitaro en Unesco (laŭta aplaŭdo).

La ĝenerala sekretario faras plurajn anoncojn. La kongresprezidanto anoncas, ke la Urbestro alvenis kaj jen sur la estradon paŝas la bona amiko de la kongreso, S-ro J. H. Turner, J.P., kun la aklama akcepto de la kongresanaro. Lia Urbestra Moŝto surprizas ĉiujn per parolo en Esperanto. Li esprimas la esperon, ke la restado en Bournemouth estis agrabla, ke la kongresanoj forportos feliĉajn memorojn pri Bournemouth precipe kaj pri Anglujo ĝenerale se temas pri eksterlandanoj.

Konvene respondas S-ro Gething, esprimante dankon pro la multaj helpoj kaj disponoj, kiujn donis la magistrato kaj li precipe dankas al la multaj funkciuloj kaj oficistoj, la ordinara laboristoj, ekz. omnibus-konduktoroj k.s. kiuj

grave kontribuis per sia komplezo al la sukceso de la kongreso. Li proponas al la anaro, ke ili kuniĝu laŭ tradicio angla je kanto de la tostkanto *Li estas bonegulo* kaj je la evidenta miro kaj ĝojo de la Urbestro la tuta anaro ekstaras por kante tosti la Urbestron en Esperanto, finante per tri plengorĝaj huraoj.

La Urbestro foriras, kaj S-ro Gething rezignas sian oficon. S-ro Malmgren esprimas al li dankon kaj al ĉiuj laborintaj por la sukceso de la kongreso, al la ĝenerala sekretario kaj kongresoficisto S-ro Nicolaisen aparte. Nome de la L.K.K. S-ro Chambers respondas.

Kaj jen sonas la lasta anonco, samtempe nostalgia kaj esperiga: La kongreso estas fermita! Ĝis revido en Parizo!

La kunvenoj de la Estraro kaj de la Komitato de U.E.A.

Ne estas plezuro esti ano de la ĉi-supraj organoj. Legante la kongreslibron mi konstatas, ke ĉi tiuj samideanoj estas devigataj partopreni ne malpli ol **3 kunvenojn de la Estraro** (sepmembra) kaj **3 kunvenojn de la tuta komitato**, t.e. la komitatanoj ĉeestantaj.

Ĉeestinte ĉi tiujn kunvenojn, ĉiu kun meze kvar horoj, mi ankoraŭfoje konstatas, kiom ampleksa estas efektive la movado, kiom da demandoj kaj problemoj aperas, postulantaj fari decidon. Imagu al vi la someran varmon, kaj vi komprenas, ke ne estas amuzo, esti komitatano.

La tagordo de la ĉi-supraj kunvenoj montras kvardekon da eroj, ege malsamaj. Grupigante ilin oni konkludas, ke la duono traktas pri internaj aferoj de la Asocio, administrado, servoj, gazeto, jarlibro, kaj . . . tre grave, la financoj. La alia duono estas aferoj pri ekstera laboro, propagando en la plej larĝa senco, kongreso, kaj rilataj subdetaloj.

Ne estas loko ĉi tie por raporti detale pri ĉi tiuj kunsidoj pro la speciala karaktero de iuj punkto kaj pro la fakto, ke poste aperos informoj pri la rezultoj de tiuj diskutoj.

Por kroni la tuton, la senindulga prezidanto kunvokas, ĝuste kiam mi skribas ĉi tiun tekston, je lasta kunveno de la U.E.A.-estraro post la unusola plezuro, kiun la komitatanoj povis ĝui: la koncerto! Sincere mi demandas min, ĉu ne ekzistas ebleco redukti dum la kongreso ĉi tiujn diskutojn, tre aferajn kaj iafoje, mi diru tion senhezite, tedajn.

Epilogo

Post tiom da belaj impresoj konvenas diri vorton de danko al la aranĝintoj de ĉi tiu kongreso. Unuavice al la urbo Bournemouth kaj ties Magistrato kun ĝia ĝentilhoma Urbestro, Leŭtenanto-Komandanto J. H. Turner, J.P.

Al la bravaj anoj de la loka grupo en Bournemouth kaj al ĝia prezidanto S-ro J. W. Chambers. Ili devis multe labori, ĉar akcepti pli ol 1400 personojn ne estas simpla tasko. Ni ne forgesu ankaŭ la kunlaborantojn en la kongresejo, kiuj deĵoris pacience kaj sindone, nepovante profiti de la kongresaranĝoj.

Al la prezidanto de la Somera Universitato, Profesoro W. E. Collinson pro la sukcesa aranĝo de la S.U.

Fine al la du sekretarioj, C. C. Goldsmith kaj O. T. Nicolaisen, kiuj komencis la laboron tuj post la kongreso en Malmö.

Koran dankon kaj amikan manpremon al ĉiuj.

Hans Jakob.



Pastro Carolfi, S-ino Zamenhof, Tadros Megalli, C. C. Yeh, F-ino Adamson

Naciaj Esperanto-kongresoj

Aŭstra

De la 16-a ĝis 20-a de Julio okazis en Graz, ĉefurbo de Stirio la ĉijara A.E.K. kun pli ol 400 partoprenantoj kaj gastoj el Germanujo, Hungarujo, Francujo, Svislando, Nederlando, Anglujo kaj Svedlando. La malferman kunsidon ĉeestis reprezentantoj de la stiria landestro kaj de la Graza urbestro kaj aliaj aŭtoritataj instancoj. Nome de A.E.F. ĉeestis la honora prezidanto D-ro Dworschak, ĝeneral-poŝtdirektoro de Aŭstrujo kaj la prezidanto D-ro Frenzel, ministro e.s. Dimanĉe okazis diservo katolika kun prediko en Esperanto de P. Hebenstreit. Samtage okazis fakkunsidoj de laboristoj kaj katolikoj, komuna fotografado kaj vizito al la urbaj vidindaĵoj. Vespere okazis *Stiria Danc- kaj Kant-Vespere*. Lunde okazis gravaj fakkunsidoj (U.E.A., Esp-amikoj, poŝtistoj, fervojistoj) kaj posttagmeze la vicurbestro S-ro Aust akceptis kaj regalis la

estrojn de la aŭstra movado en la Urbdomo. Post tio oni inaŭguris la novan *Esperanto-placon*. Okazis la jarkunveno de A.E.F., Internacia kantvespero, ekskursoj kaj ĉio brile montris la aktivan apogon de la oficialaj instancoj en Aŭstrujo por nia afero.

R.C.

Ĉeĥoslovaka

Dum Pentekosto okazis en la grava urbo Liberec la 7-a Esperanto-Kongreso ĉeĥoslovaka, kiun ĉeestis 760 delegitoj el la tuta lando kaj gastoj el Pollando kaj Svislando. La urbo Liberec vivis dum tri tagoj sub la Verda Standardo en sencoj reala kaj figura. Protekton al la kongreso transprenis la Ministro por Informoj kaj Klerigo, S-ro Václav Kopecký.

En la kadro de la kongreso okazis kunvenoj de la Junulara Sekcio de EACSR, de Skolta Ligo kaj la BAT-anaro en ĈSR. Krome okazis Esperanta ekspozicio. La poŝto stampis leterojn per speciala nuligilo, la radiostacio de Liberec elsendis ĉiutagajn raportojn. Oni aranĝis Interkonatiĝan vesperon, meson de Ĉeĥoslovaka eklezio (celebranto episkopo D-ro M. Novák, fakdelegito de U.E.A.) kaj Katolikan meson (prof. J. Filip). Saluttelegramon oni sendis al Prezidanto K. Gottwald kaj al Ministro de Informoj. La jarkunsido montris gravan progreson en ĉiuj fakoj, inkluzive de membrovarbado. En la Artvespero prezentis sin la Filharmonio de Liberec, membroj de la Nacia Teatro en Praha—Höger kaj Koziková—operkantistino Borská kaj konservatoria prof. Scheiber el Brno. Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon kompletigis sukcesan kongreson.

J.M.

Germanujo

Inter scenoj de granda entuziasmo okazis la dua postmilita kongreso de G.E.A. en Göttingen je Pentekosto. Trajto de la kongreso estis la "Universitato" en kiu prelegis pluraj eksterlandaj gastoj, S-roj J. D. Sayers, E. Cortvriendt, T. Jung, A. Ĉe, Prof. Agamjan, D-ro Neergaard, M. Stuttard kaj S-ino Isbrucker. Financan subtenon donis la Kulturministro, kiel ankaŭ apogon moralan. Gravajn decidojn pri administrado oni faris en la jarkunsido de G.E.A. per kiuj oni esperas starigi la organizaĵon sur firma bazo.

Okazis junular-tendaro post la kongreso. Efektive estis granda ĝojo vidi tiom da junaj gesamideanoj flue parolantaj nian lingvon. Apartan impreson faris la "Verdaj Paseroj" el Berlino, infangrupo sub gvido de F-ino Eva Noeske, kiuj kantas sian vojon al la koro de la aŭskultantoj.

Oni provizore decidis, ke la venontjara kongreso estu en Mainz.

* * *

La Germana Kongreso en Göttingen finiĝis ĉi-jare per gravaj dutagaj prelegoj. Kunlige kun ĝi okazis postkongresaj prelegoj en aliaj germanaj urboj, kiujn S-ro Mason Stuttard el Anglujo grandsukcese efektivigis. En Braunschweig li parolis laŭ invito de la ĉefurbestro en la kadro de la popolaltlernejo antaŭ 70 aŭskultantoj pri la Historio de Esperanto. F-ino K. Jahns tradukis. En Frankfurt/Main li prelegis en Amerika Domo en du grandaj kunvenoj (140 kaj 150 partoprenantoj) pri Postmilita Britujo, kaj en Krefeld en la kadro de grupa aranĝo kun rimarkinda partopreno de eksteraj gastoj. La praktika valoro de la prelegoj estis ne nur la propagando por Esperanto, kaj la perfekta pruvo, ke Esperanto ebligas la interpopolan interkompreniĝon, sed la senpera informado kvazaŭ de homo al homo pri la cirkonstancoj en aliaj landoj. La amikeca sintenado de la preleginto restas simpatie en la memoro de multaj aŭskultantoj kaj restas nur bedaŭro, ke la hodiaŭaj cirkonstancoj en Germanujo ne permesis similajn aranĝojn en multaj aliaj lokoj.

G.E.A./mor.

Norvega

Norvega Esperantista Ligo dum Pentekosto jarkunvenis en Trondheim. La kunvenon partoprenis 50 gesamideanoj. La 4-an de Julio okazis ĝenerala kunveno de la Eldonejo Esperanto A/S kaj sam-vespere la Interkonatiĝa Vespero. La 5-an kaj 6-an okazis la ĝenerala kunveno de N.E.L. en kiu oni aprobis la jarraporton kaj bilancon. Diskuton pri propagando sekvigis parolado de la propagandestro S-ro J. Matland. Oni akceptis rezolucion kontraŭ *Esperanto Simpligita* de J. Kubacki, kaj rezolucion por peti la norvegan radion elsendi Esperanton. Elektiĝis nova estraro.

C.S.B.

Usona

La 39-a Nord-Amerika Esperanto-Kongreso okazis 1-4 Julion en Delaware. La Urbestro malfermis ĝin kaj donis al S-ro G. Nickel, estro de la loka komitato, simbolan ŝlosilon de la urbo. La ŝtata registaro sendis salutleteron. Inter la detaloj de la programo estis: tri longaj kaj multaj mallongaj radio-programoj, detalaj artikoloj en la gazetaro, broŝuro de la Komerca Ĉambro, bonegaj ekspozicioj en publika biblioteko kaj banko, du publikaj kunvenoj kun Ĉe-metoda demonstracio, ekskurso al konata bieno—Longwood Gardens—de la industriisto P. S. DuPont de Nemours.

Rezolucio "reasertas la gravecon de unuigita laboro de ĉiuj Esperantistoj kaj la necescon de forta, agema organizo" kaj "admonas ĉiujn fidelajn amikojn de EANA, ke neniuj klopodoj konkurencantaj tiujn de la Centra Oficejo estu entreprenataj sen antaŭa konsento de la Estraro."

Unu rezolucio proponis, ke EANA petu, ke la francaj kaj svisaj radio-dissendoj en Esperanto

estu kelkfoje direktataj al Nord-Ameriko je horo ne pli frua ol 23,00 laŭ Greenwich. Tria rezolucio koncernis saluton de EANA al la Ameriko Radio-Relajsa Ligo okaze de 25-jara datreveno de la decido, per kiu la Ligo rekomendis Esperanton kiel internacian radio-lingvon.

Laŭ la jara raporto de S-ro G. A. Connor, Ĝen. Sekr. la Komitato sukcesis havigi al Esperanto fincan subtenon de grava usona fondaĵo. Kelkaj miloj da dolaroj jam alvenis, kaj oni esperas ke plua subteno estos ricevebla. EANA nun havas 713 membrojn. Oni elektis la Estraron de EANA por nova jaro. Ĉeestis gastoj el Britujo kaj Filipin-insuloj. Parolis ankaŭ S-ro T. Goldman, antaŭnelonge Usona Vickonsulo en Rotterdam.

Oni raportis, ke la Nacia Eduka Asocio (National Education Association) plej granda instruista asocio en Usono (441,127 membroj) ĵus eldonis broŝuron pri Esperanto, kiel N-ro 183 de la famkonata kolekto *Personal Growth Leaflets* (Flugfolioj pri Persona Elvolviĝo). Kiel la ceteraj, ankaŭ ĉi tiu estas 16-paĝa en formato simila al la Esperanto-ŝlosiloj. Ĝi enhavas trafajn informojn pri la neceso, historio, gramatiko kaj praktikaj uzoj de Esperanto. La Asocio presigis 20,000 por la unua eldono, sed intencas presigi pliajn. La prezo estas unu cendo. EANA uzos la broŝuron propagandcele kun aliaj propagandiloj.

La Radio-stacio de la urbo New York WNYC disaŭdigis 30-minutan diskuton pri la temo *Unu mondo-Unu lingvo; Ĉu ni bezonas internacian lingvon?* la 23-an de Marto. Partoprenis du profesoroj de urbaj universitatoj (D-roj K. Gries kaj H. Levy), UNO-oficisto (Wladimir Karakacheff) kaj la Ĝen. Sekr. de EANA kaj redaktoro de *Amerika Esperantisto* (G. A. Connor). Oni menciis *Basic English* sed neniu subtenis ĝin. La du profesoroj laŭdis la klasikan latinan literaturon kaj la kvalitojn de la latina lingvo, sed esprimis dubon, ĉu la latina taŭgas por modernaj internaciaj rilatoj. S-ro Connor diris, ke la sole praktika solvo de la moderna interlingva problemo estas Esperanto. La radiostacio dissendis al aŭskultantoj multobligitan tekston de la diskuto kun "studgvidilo" kun simpla teksto en Esperanto kaj informoj.

Majkov :

Birdeto

Hieraŭ mi, kun kora ĝoja trem'
Malfermis kaĝon kaj birdeton lasis :
Kantiston al arbaroj mi donacis,
Donacis mi liberon al ĝi mem.

Ĝi malaperis ĝojigita for
En sunradioj de blueta tag' dronante,
Kaj tiel ĝi ekkantis forflugante,
Kvazaŭ pri mi ĝi preĝis al Sinjor'.

elrusigis M. Soloviev.

Datreveno de naskiĝo

Pro eraro en la dato okazis ke la lasta numero de nia gazeto ne informis pri la 60 jara datreveno de naskiĝo de la Prezidanto de nia Akademio, Sinjoro **Isbrucker** je la 19a de Julio 1949. Nebezzone citi la grandan meriton kiun akiris samideano Isbrucker kiel aktiva esperantisto en la plej diversaj sferoj de nia agado. Nia deziro estas ke li povu daŭrigi sian riĉan agadon ankoraŭ dum multaj jaroj por la bono de nia movado.

Kaj preskaŭ samdate, nia kara Doktoro **Edmond Privat**, iĝis 60 jaraĝa, 17an de Aŭgusto 1949. Lia nomo aperas por la unua fojo en la rilato al la unua kongreso de Esperanto en Bulonjo sur Maro, kiun li ĉeestis, ĉestante 16-jarulo. Kaj jam tie li brilis kiel oratoro kaj sendube estus gajninta la ĉefan premion en konkurso. Kvankam retiriĝinte iom el la aktiva movado, Doktoro Privat daŭre estas ligata al nia movado kaj klopodas por ĝi en rondoj internaciaj. Koran bondeziron kaj ĝis ebla revido en estonta kongreso.

Frey, Rudolf Michael, Vieno mortis 14-an de Julio, 65-jara. Ŝtata oficisto kaj poste Kalkula konsilanto en la Urba administrado de Vieno, samideano Frey dediĉis sin plene la nia movado kaj antaŭ 20 jaroj organizis la unuan turisman propagand-vojaĝon por sia lando. Danke al sia granda energio li sukcesis gajni al nia afero gravajn personojn. Li partoprenis aktive en la okazigo de la Internacia konferenco *Esperanto en la praktiko* en Vieno 1937. Spite de grava malsano li ne ĉesis labori por Esperanto kaj lia lasta sukceso estis la gajno de la Aŭstra Ĝenerala Poŝtdirektoro, D-ro Dworschak, al nia afero. Samideano Frey partoprenis la kongreson en Bern. Lia memoro restas inter ni.

Geissler, Josef, Vieno, fine de Majo 1949. Fakinstruisto kaj lektoro de Esperanto en la Viena Altlernejo por Monda Komerco. Silenta persista propagandisto, gvidinta plurajn kursojn sukcese.

Noto

Responde al onidiroj kaj ankaŭ al erariga informa en la angla gazeto *Daily Graphic* (kiu tamen en sia eldono de 13.8.1949 korektis tion) ni informas, ke partoprenis en la U.K. en Bournemouth delegitoj el Ĉeĥoslovakujo, Pollando, Jugoslavujo. Roman Sakowicz el Nowa Sol, Pollando, prelegis en la Somera Universitato pri Frederiko Chopin kun muzikaj ilustraĵoj de S-ino Karpf, kiun lastan provizis la Pola Legacio en Londono.

Redakcia noto : En la ĉefartikolo de la Julia numero (526) *Eminentuloj* mankis la nomo de la plej distinga mecenato kaj aktivulo de nia movado, nome Generalo Sebert, Parizo. Legantoj bonvolu kompletigi la artikolon per lia nomo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 219.

1-an de Aŭgusto 1949

NOVAJ DELEGITOJ

Britujo

Godshill (Isle of Wight). D : Pastro H. O. Mason.
London. FD (Doganaj kaj Akcizaj aferoj) : R. Abram,
BM/CXXH, London, W.C.1.

Bulgarujo

Sofia. FD (Vegetarismo) : Ivan H. Krestanov, ul. 6
Septemvri 2.

Egiptujo

Cairo. FD (Filozofio) : J. Sabbah, 1 rue Amir Kadadar,
Midan Ismailia. Tel : 54745.

Finnlando

Outokumpu. FD (Medicino) : D-ro L. I. Lappi.

Francujo

Arles-sur-Rhône. D : E. Borel, Villa de l'Etoile, av.
Victor Hugo. Tel : 726.
Cannes (A.M.) D : C. Cresp, 14 rue du Dr. P. Gazagnaire.
Tel : 91463.
Thiers (P. de D.) D : M. Dessapt, 16 rue Grenette.
VD : B. Gonon, 31 rue du Dr. Zamenhof.

Germanujo

Bad Aibling. D : R. Hauber, Frühlingstr. 2. Tel : 70.
Bad Pyrmont. D : A. Strauch, Zimmermannstr. 9.
FD (Katolikismo) : La D.
Hannover. FD (Komerco) : S-ino L. Zisseler-Harleb, (20)
Hannover-Limmer, Harenbergerstr. Gartenbauschule.

Hispanujo

Olesa de Montserrat. D : A. Servet Marti, Estacion
F.F.C.C., Catalanes, La Puda de Montserrat.

Hungarujo

Budapest. FD (Sindikataj aferoj) : L. Márton, X,
Bánya-u. 2.
Györ. FD (Filmoj) : A. Gauder, Rónay Jácint-str. 2 b.

Islando

Vestmannaeyjar. D : H. Gudnason, Fíflgötu 5.

Italujo

Bologna. FD (Abelkulturo) : D-ro O. Nanni, FF.SS.
Via Matteotti 5. Tel : 56463-27289.
Verona. FD (Katolikismo) : A. L. Reni, Via Roverto 6.

Izraelo

Beer-Jaakov. FD (Vegetarismo) : J. Dorn, P.O.B.2133,
Tel-Aviv.
Tel-Aviv. FD (Pacifismo) : Š. Zamir, Ichak Elhanan

Kanado

Fort William (Ont.) D : C. C. Macdonald, Room 1,
Royal Bank Chambers. Tel : 3-3471.
FD (Juro) : La D.

Kongo Belga

Leopoldstad. D : E. Symoens, Prefedt van het Koninklijk
Atheneum.

Norvegujo

Bergen. VD : M. Wagle Jørgensen, Jomfrustien 7.
Tel : 99329.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Socialismo) : B. A. Ollerenshaw, 12
Jellicoe Road, Murray's Bay.

Rumanujo

Cluj. D : E. Schlesinger, Str. Molotov 22.
FD (Filatelo) : La D.

Svedujo

Hälsingborg. FD (Trafiko) : A. Lundgren, Mell
Stenbocksgatan 9. Tel : 15767.

Svislando

Arbon. FD (Teksaĵ-maŝinoj) : W. Kobelt, Landquartstr.
81 b.

ŜANĜOJ

Belgujo

Assebroek. D : vakas.
Oostduinkerke. D : vakas.

Britujo

Manchester. FD (Telefonio) : nova adreso : 13 High
Bank Drive, Manchester 20.
Stratford-on-Avon. D : vakas.
Wallington. FD (Filozofio) : vakas.

Danujo

Aalborg. FD (Virinaj aferoj) : vakas.
Odense. D. kaj FD (Komerco) : nova adreso :
Vestergade 51.

Finnlando

Hämeenlinna. FD (Medicino) : vakas.

Germanujo

Berlin. FD (Fotografio) : nova adreso : Foto-Gross,
Bln.-Lichterfelde-W., Tulpenstr. 7.

Hispanujo

Manresa. VD : vakas.

Hungarujo

Budapest. FD (Elektraĵoj) : vakas.
Györ. FD (Lingvoj) : vakas.
Szendro. D : vakas.

Izraelo

Tel-Aviv. D : nova adreso : Jehuda Halevi-str. 109.

Kongo Belga

Elisabethstad. D : vakas.

Pollando

Lódz. FD (Teknikaj aferoj) : nova adreso : ul.
Piotrkowska 56 m. 47.

Portugalujo

Beja. D : nova adreso : Bairro Dr. Oliveira Salazar
8—D.
Lisboa. FD (Turismo) : vakas.

Svedujo

Göteborg. FD (Komerco) : nova adreso : Konstapels-
gatan 4 A. Tel : 15.75.14.
Hudiksvall. D : vakas.

Svislando

Genève. D : vakas.

Marbach. D. kaj FD (Turismo) : vakas.

Usono

Bloomington (Indiana). D kaj FD (Universitataj aferoj) : vakas.

Flint (Michigan). D : vakas.

San Francisco (California). VD : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro M. Jakupović, Zemun, Jugoslavujo.

F-ino G. H. Moxon, Westcliff-on-Sea, Anglujo.

S-ro B. Rajšić, Zemun, Jugoslavujo.

S-ro M. Perreau, Ifana, Francujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

337. L. Magotteaux, Liège, Belgujo.

338. R. Geerinck, St. Niklaas, Belgujo.

339. R. G. Millidge, Sutton, Surrey, Anglujo.

340. S-ro T. H. Hopkins, Keston, Anglujo.

341. S-ro J. A. Nord, Slöinge, Svedujo.

342. S-ro M. Perrier, Strasbourg, Francujo.

343. S-ro L. Apcher, Meknés, Maroko.

344. S-ro J. Vajdlih, Zagreb, Jugoslavujo.

345. S-ro E. Kasovic, Zagreb, Jugoslavujo.

346. S-ro H. R. Hansen, New York, Usono.

347. S-ro J. H. Schackmann, Cincinnati, Ohio, Usono.

348. S-ro A. Carmo, Petropolis, Brazilo.

349. S-ro G. Persson, Astorp, Svedujo.

350. S-ro G. Cettini, Sondrio, Italujo.

351. S-ro S. Klytides, Nicosia, Cipro.

352. S-ro B. Beau, Macon, Francujo.

353. S-ro B. Kruk, Livry-Gargan, Francujo.

354. S-ro Phan Van Cau, Saigon, Hindoĉinujo.

DONACOJ : P. Blaise 12ŝ. 6p., H. Davies 20ŝ., A. Ploussu 10ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Bertin. Al Ges-oj A. en Parizo naskiĝis filino Nicole.

Bonamy. Ges-roj P. en Saint-Nazaire (Francujo) anoncas la naskiĝon de sia filo Pierre, 27-an de Junio, 1949.

Moen - Molenaar. Al ĉefdelegito de U.E.A. en Nederlando kaj lia edzino naskiĝis 7 Aŭg. filino Olga.

Oliver. Al Ges-roj A. C. Oliver, Chorleywood (Anglujo) filino Neroli Ann, 13-an de Julio, 1949.

Ramaker. A. Ges-roj Ramaker en Zwollerkerspel, Nederlando naskiĝis 5 Aŭg. filino Rita Irene.

Walder. Al Ges-roj O. Walder, Romanshorn (Svislando) filino Verena, 9-an de Julio, 1949.

Edziĝoj

Servet-Riba. 27-an de Aprilo geedziĝis S-ro Angel Servet i Martí, Del. en Olesa de Montserrat (Hispanujo) kun F-ino Angelina Riba i Jovés.

Jubileo

Gieseler-Fischer Ges-roj Walther en Berlin (Germanujo) festis la 10-an de Aŭgusto la 25-an datrevenon de sia geedziĝo. Korajn gratulojn.

Niaj Mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Benson S-ro Harold, Delegito en Blackburn, Anglujo la 20-an de Aŭgusto. Multjara laboranto por nia afero.

Bulenda S-ro Paul, en Drifield, Anglujo, 19-an de Aŭg. Konata Pola rifugiĝinto, kiu karigis sin al siaj "adoptintoj". Pluraj gesamideanoj ĉeestis la entombigon en Haslingden.

Carmo S-ro A. Lan do, Del. en Petropolis, Brazilo. Vigla kaj senlaca laboranto.

Georgiev S-ro Milčo en Sofia (Bulgarujo) mortis 60-jara, la 24-an de Majo, 1949. Aktiva propagandisto de nia afero.

Padfield S-ro Wilfred Walwyn en Bath (Anglujo) 18-an de Julio, 1949. Inter la veteranoj en la *Ora Libro* troviĝas la jena noto : W. W. Padfield, Angla inĝeniero. Fondis grupon en Ipswich en 1905. Pacifisto, trad. *Por Arbitracio* de Carnegie. Verkis artikolojn kaj lingvajn notojn por sciencaj kaj sociaj revuoj kaj aliaj.

Soloniewicz S-ro D-ro R., Del. en Zgierz, Pollando. Unu el la malnovaj laborantoj en Pollando. Grava bat por la tiea movado.

INTERNACIA KONKURSO 1949

Stato je 31-a de Julio, 1949

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	2575	160.9
2. Islando ..	500	630	126.0
3. Svedujo ..	4100	4944	120.6
4. Belgujo ..	1700	1901	111.8
5. Portugalujo	700	765	109.3
6. Aŭstralio ..	950	925	97.4
7. Usono ..	3000	2888	96.3
8. Nederlando	5400	5002	92.6
9. Urugvajo ..	250	230	92.0
10. Britujo ..	13000	11755	90.4
Nov-Zelando	900	814	90.4
11. Germanujo ..	1600	1545	90.3
12. Svislando ..	1400	1260	90.0
13. Brazilo ..	2000	1793	89.6
14. Polujo ..	4000	3550	88.7
15. Italujo ..	1600	1415	88.4
16. Danlando ..	3200	2785	86.9
17. Argentino ..	900	705	78.3
18. Finnlando ..	2000	1565	78.2
19. Norvegujo ..	1300	1010	77.7
20. Sud-Afriko ..	250	190	76.0
21. Francujo ..	6200	4662	75.2
22. Egiptujo ..	300	225	75.0
23. Kanado ..	300	220	73.3
24. Hungarujo ..	1800	1270	70.5
25. Izraelo ..	400	230	57.5
26. Irlando ..	300	165	55.0
27. Aŭstrujo ..	1000	505	50.5
28. Hispanujo ..	1200	470	39.1
29. Bulgarujo ..	1600	280	17.5
30. Ĉeĥoslovakujo	5300	475	9.0

Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro kompare kun la fiksita kvoto, U.E.A. donos premion £10. Ĉiu delegito en la koncerna lando ricevos libropremion.

Leteroj de L. L. Zamenhof



La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus
retrovita korespondo kun la francaj
eminentuloj. Prezento kaj komento de
Prof. G. Waringhien.

2a volumo, 1907-1914

374 paĝoj

21×14.5 cm., bindita

Prezo 15ŝ., afanko 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam
konigas detalojn de vivo, karaktero kaj
sentimento de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi
libro ne temas nur pri leteroj de la majstro,
sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la
movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon
kaj detruos aron da legendoj.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Esperanto sukcesos per la praktika uzado

Komercistoj, fabrikistoj aliĝu al la

Esperantista Komerca Ĉambro

Informojn donos al vi la naciaj perantoj :

ACORAJ INSULOJ

Kotizoj

S-ro Domingos GARCIA,
Farmacia Garcia, Horta,
Fayal, Aĉores - - - Esk. 60

BELGUJO

S-ino J. PLYSON, 185, rue
Jourdan, Bruxelles - - - belg. F. 100

BRITLANDO

J. Ll. FORD, 8, Airedale Road,
Ealing, London, W.5. - ŝilingoj 11

DANUJO

Rich. FIIRGAARD, Oversöisk
Agentur, Box 291, Aarhus - kronoj 11

GERMANUJO

Waldemar REINHOLD, Johan-
niterstrasse 84, Duisburg (22a) markoj 8

INDONEZIO

Liem Tjong Hie, Toko Djohar,
Doewet 60, Semarang - florenoj 7

IRLANDO

S-ino Ui UIGINN, Kom. Esp.
Kompanio, 7, Cuirt Mhic
Eoin, Dublin - - - ŝilingoj 11

ITALUJO

S-ro Guido Rossi, M.U.I.M.,
32, via Andrea Doria, Milano liroj 1.460

MADEJRO

Lourenço de GOUVEIA, Rua das
Dificuldades 28 e 30, Funchal esk 60

MAROKO

Marcel CUENE, 10, rue de
Gascogne, Meknés - - - francs 500

NEDERLANDO

C. NELSON, v. Slingelandtlaan,
30, Dordrecht - - - guld. 6.25

PORTUGALUJO

S-ro José ANTUNES, 106, rua
dos Fanqueiros, Lisboa - esk. 60

SVEDUJO

R. PEHRSSON, Ingeniörsfirma,
Kungsgatan, 56, Stockholm - kronoj 10

aŭ la ĝenerala sekretario :

Richard LEVIN

55, avenue Félix Faure, LYON, Francujo

Se interesa romano plaĉas al vi, nepre legu la libron

MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

El la angla lingvo tradukis

MASON STUTTARD

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, afranko 6p.

“La interesa krim-romano temas pri la perfido de sekretaj kunsidoj de la angla fmilitestraro dum la dua mondmilito. La intrigo estas jena: kiel estas eble, la malamiko sciĝis pri la sendo de valoraj valvoj per trajno kaj kiel li povis eligi—feliĉe alian—vagonaron? Multaj homoj estas suspektataj, la kriminalista arto, la fama Scotland Yard, funkcias grandskale kaj post lacigaj serĉadoj, dramaj streĉaj luktoj oni malkovras ĉion.

La verko mem estas tre streĉa, ni povas ĝin nur rekomendi. Leĝi ĉi tiun libron estas vera ĝuo kaj tre instruplena travivaĵo, ĉar oni ekscias multon ne nur pri la krimesploro sed ankaŭ pri la aranĝoj, metodoj kaj malhelpaĵoj de la fervojista servo.”

Esperantista Slovaka

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,

S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.

Esperanto-Esperanta.

Prezo £1 angla, afranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represo de la dua eldono, sed NE reviziita eldono. Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.